

P A C O kaj J U S T E C O.

1946

Monata revuo de la grupo B r u g g e.Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista

.....

: Prezidanto: Drs. F. Roose, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge. Tel: 31981. :

: Sekretariejo: Roose-De Kersgieter, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge. :

: Propagando: Maertens Gr., Nieuwstraat 54, Assebroek. :

: Poŝtkonto: 291429, Maertens Gr., Assebroek. :

.....

Nia historio laŭ la birdperspektivo.

Cirkaŭ la jaro 100 antaŭ Kristo, la Norda limo de la Roma imperio estis la rivero Donau. Ankaŭ Hispanujo apartenis al tiu imperio kaj la plej Sud-Orienta parto de la nuna Francujo, la terpeco laŭlonge de la maro. En la mezo de tiu jarcento Cezaro venis konkeri Galujon (Galio), nian regionon kaj Britujon. Li bezonis 8 jarojn por plenumi tiun taskon. Tiam la norda limo estis la du riveroj Rijn kaj Donau. Norde de la Donau kaj oriente de la Rijn loĝis la Germanoj: Alemano, Frankoj, Saksoj, Vandaloj kaj plej oriente loĝis Okcident- kaj Orient-Gotoj. La unua Roma imperiestro Aŭgusto klopodis por disvastigi sian regnon super Germana teritorio, sed li malsukcesis. Okcidente de la Rijn loĝis la Gabloj. La plej nordan parton inter la maro kaj la riveroj Rijn kaj Seine Cezaro nomis: Belgujo. En tiu lando loĝis tre malsimilaj popoloj kiuj apartenis al la Germanoj kaj al la Keltoj. Kelkaj nomoj: Morinoj (plej okcidente), Menapioj, Aduatukoj, Nervioj k.a. En la 4^a jarcento post Kristo komenciĝis la invadoj de la Germanoj trans la Rijn. En la komenca periodo tiuj invadoj konsistis nur el unuopuloj aŭ unuopaj familioj kiuj venis en la Roman imperion, tiel malofte, ke oni tute ne konsciis ke okazis invado. Sed je la fino de la 5^a jarcento estis amasegoj kiuj transiris la Rijn. La Roma imperio devis cedi la Rijn kiel protektan limon kaj organizis novan laŭlonge de la komerca vojo Bulonjo, Bavai, Tongeren, Maastricht, Koln. Norde de tiu linio estis precipe la Frankoj kiuj enloĝiĝis. Sub Alodvig (kiu konvertiĝis al Kristianismo) ili konkeris tutan nunan Francujon (de tie la nomo! Frankujo).

Kaŭze de tiuj invadoj la popolo ŝanĝiĝis. Norde de la citita trafikvojo la loĝantaro iĝis tute Germana. Sude de ĝi, la envenintaj Germanoj estis ne sufiĉe multnombraj kaj perdiĝis en la aro de Latiniĝintaj homoj. Post la epoko de Alodvig (Klovis) la regno estis dividita en 4 partoj: Aŭstrasio, Neŭstrio, Akvitanio kaj Burgondio. La tiamaj kortomastroj de Aŭstrasio akaparitis pli kaj pli la potenco. La filo de unu inter ili, nome de Pepeno la mallonga, estis Karlo la Granda (+ 814) kiu starigis vastan imperion. Post lia morto, per la traktato de Verdun (843) tiu granda regno estis dividata denove, sed nun en 3 partoj. 1) Francia okcidenta ĝis la Skeldorivero 2) Francia orienta, oriente de la Regno kaj 3) La Lotaringio inter Skeldo kaj Rejno. Tiu meza parto estis ankoraŭ plurfoje dividata kaj parto post parto ĝi venis en la orientan aŭ Germanan regnon sub Germana imperiestro. Tiuj du grandaj partoj havas nun apartan evoluon en la historio. La Germanaj imperiestroj estas unue tre fortaj kaj energiaj viroj sed poste malrapide ilia potenco malsupreniras kaj paralele sed inverse iliaj subulaj estroj, grafoj kaj dukoj, levas la kapon kaj klopodas por iĝi sendependaj. Tiel ekestas la gravaj dukolando Brabanto, Grafolando Henegouwen (Hainaut), Grafolandoj Holando, Frislando, kaj aliaj. Kontraŭe, en Francia okcidenta la reĝoj estas grandsignifaj. Sed en la posta tempo ili sukcesas regajni malrapide sed certe siajn perditajn influon kaj superecon super la subulaj grafoj kaj dukoj. Sed tio ne ankoraŭ estis la kazo en la 9^a jarcento. Cetere dum tiu tuta jarcento la Nordmannoj venis konstante invadi niajn regionojn, forŝtelis kaj detruis ĉion, tiel ke estiĝis tie-ĉi bela ŝaoso. La reĝo bezonis la helpon de teritoriaj estroj, estretoj, kiuj kompreneble profitas la okazon por postuli privilegiojn ĉiuspecajn kaj aldonon de teritorio.

.../...

Tion faris Balduino I^a, la unua grafo de Flandrujo kaj kiam la posteulo Balduino II^a venis reorganizi la teritorion li definitive fiksissian sendependon aŭtoritatecon kaj plie pligrandigis sian grafolandon per konkerado.

Ĝis la 15^a jarcento niaj regionoj vivis aparte. Foje ja okazis ke Henegouwen kaj Flandrujo venis sub unu sama grafo samkiel Henegouwen, Holland, Zeeland kaj Frislando sed tio estis nu partempa. Sed kiam en 1384 Margareta la filino de la lasta Flandra grafo Ludvigo de Male, edziniĝas al la duko de Burgundio, tiam venas ŝanĝiĝo. Tiuj dukoj klopodas por konkeri ĉiujn provincojn de la Nederlando kaj por unuecigi ilin. En la unua tasko ili sukcesas, en la dua nur malgrandparte. Ili ja ne rajtas havi titolon kiel ekz. "reĝo de la Nederlando" aŭ io simila, sed ili devas nomi sin grafo de Flandrujo, duko de Brabanto, grafo de Holando....k.t.p. Kiam Karlo la Maltima volas unuigi teritorie la Nederlandajn provincojn kun Burgundio, li malsukcesas kaj mortas kaj lia filino Maria devas cedi al la partikularismaj emoj de la diversaj provincoj. Ŝi edziniĝas al Habsburgano kaj el tiu familio venas Karlo la V^a kiu naskiĝis 1500. Ree estis starigata granda imperio enhavante Hispanujon, la Nederlandojn, Germanujon, parton de Italujo kaj la ĵus trovitajn koloniojn en Ameriko. Karlo V^a dekretis ke niaj Provincoj ne plu povis esti disigitaj. Kaj denove centrigaj institutoj estis kreataj. Sed sub la regado de lia filo Filipo II^a grandaj religiaj kaj politikaj malfacilaĵoj malkvietigas la Nederlandojn ĝis ĝenerala ribelado devigas lin sendi armeestrojn kiel Alva kaj poste Farnese.

Tiu lasta rekonkeris la Sudan parton de la Nederlandoj. 1585 Antwerpen falis en liaj manoj. Sed la parto de la Nederlandoj malantaŭ la multegaj akvovojoj kapablis malhelpi envenon de la Hispanoj. Multaj precipe Protestantoj elmigras el la Sudo al la Nordo. Ankaŭ Katolikoj el Nordo venas Suden. En 1598 Filipo II^a donas ŝajnan liberecon al la Sudo. La Nordo iras al kompleta sendependeco kaj al glora tempo. Por la Sudo nun venas malprosperega tempo. Konstante militoj. Nordanoj kiuj volas rekonkeri sudajn partojn. Kaj en la dua duono de la deksepa jarcento, la reĝaj kaj reĝaj militoj de la Franca Reĝo Ludoviko XIV^a kiu forprenas el la Sudaj Nederlandoj la plej sudan parton nun nomatan "Franca Flandrujo". En la komenco de la dekoka jarcento la Sudaj Nederlandoj estis donataj al Aŭstrujo. Nun venos jarcento de relativa kvieto sed ni estas konsiderataj tamen kiel lando ekspluatenda kaj ne kiel samvalora kaj egalrajta lando al Aŭstrujo. Enlande la Aŭstria imperiestroj konstruigas vojon, akcelas prosperon de ekonomio k.t.p. sed eksterlande niaj interesoj devas cedi por aliaj. Nur en la mezo de tiu jarcento okazas militoj kun la Francoj kaj en 1792 venas denove la invado de la Francoj, sekve de la Franca revolucio kaj ilia milito kontraŭ Aŭstrujo. Ni estas alfiksataj al Francujo. Tuj poste denove al Aŭstrujo...por unu jaro, kaj tiam ree al Francujo por dudek jaroj. Dum tiu relative mallonga periodo ni konatiĝis al diversaj reĝimoj. La revolucia reĝimo kun ĝia persekutado de la religio kaj kiel protestego la kontraŭa "kampanmilito". Poste la Napoleona reĝimo kun ĝia ordo, prosperigo multflanka sed ankaŭ kun ĝia ega severeco kaj la daŭrantaj rekrutadoj de junuloj por la senĉesaj militoj de la Aglo. Sub Napoleono ankaŭ Holando estis alfiksata al la imperio. Unue ĝi estis aparta sub regado de frato de Napoleono sed poste ĝi estis tutsimple alfiksata ĉar tiu frato ne sufiĉe obeis al Bonaparto. Post la definitiva malvenko apud Waterloo 1815, ekestis denove la Reĝlando de la Nederlandoj kun la Valona parto de hodiaŭa Belgujo. Tre baldaŭ estiĝis malfacilaĵoj politikaj kaj religiaj. Valonoj kaj francigita Flandra nobelularo estas malamikaj al tiu Holanda reĝo kaj la Katolikoj estas malamikoj al tiu Protestanta reĝo. Ankaŭ Francujo sentis la starigon de tiu nova regno kiel fortikaĵon kontraŭ la granda suda lando. Tial multaj Francoj tuj venas helpi en la ribelado de 1830 kaj revas pri alfikso de Belgujo al Francujo. Sed tion lastan Anglujo ne permesis. Belgujo devis esti aparta ŝtato. Rusujo volis kontraŭ batali la ribelantojn sed la rusaj armeoj, trairantaj Polujon, estis tre akrege atakataj. Tiomaniere kvazaŭ duonmiraklo, la belga revolucio sukcesas. Estis kompreneble Valonaj kaj Francemaj personoj kiuj gvidis la politikon en la nova ŝtato. Nun komenciĝis subpremado de ĉio kio estis Flandra. Sed post kelkaj jaroj eksteris Flandra movado por egalrajtigi Flandrojn kiun Valonojn en la belga ŝtato.

Sed rapida, precipe inter studentoj, la movado iĝis nacionalista sur inspirita de la ideo ke ĉiu popolo, nedividita, devas formi apartan ŝtaton sendependan de la aliaj. Do, konkrete, la suda parto de Nederlando en Belgujo devas reunuigi al Norda Nederlando kaj Valonujo devas aliĝi al Francujo. Sed nun la Katolika ekleziularo denove miksiĝis en la politiko kaj ĉar ĝi volis konservi la unuecon de belga ŝtato, ĝi tre akre persekutadis la nacionalistojn. Venis du mondmilitoj kaj la nacionalistoj kredis povi efektiviĝi sian revon helpante la Germanojn. Dufoje tio malsukcesis. Nun Belgujo estas ree memstara sed la interna politika situacio estas tre konfuza kaj tre akre malamika. Ekstere nia lando dependas de kelkaj potencaj najbaroj kiuj ankaŭ tute ne akordiĝas. Do la estonteco mondpolitika povas ankoraŭ doni surprizojn. Ĉie la ekonomia stato suferas pro tiu politika ĥaoso sed ĉe ni la ekonomio ne estas tre malbona kaŭze de nia kolonio Kongo kiun akiris por ni reĝo Leopold II^a kaj kiun li donis al belga ŝtato en la komenco de tiu-ĉi jarcento.

Tri mondbildoj.
=====

Imagu foje ke vi faras vojaĝon al Cuba.

Jen kelkaj detaloj pri la Universitato.

La Universitato de Havana estas fondita en la jaro 1728. Ĝis 1900 ĝi estis lokita en la malnova Havana, poste oni translokiĝis ĝin al la nuna "universitata Monteto".

Ĉiuj konstruaĵoj estas novaj; la plej malnovaj estis konstruataj antaŭ 30 jaroj.

Nun la Universitato havas proksimume 15.000 studentojn.

Ĝi konsistas el 13 fakultatoj, ĉiuj enhavantaj diversajn karierojn.

La universitato estas lokita en la centra parto de la urbo. Ekster tiuj de la diversaj fakultatoj, aliaj gravaj konstruaĵoj, estas: la muzeo, la sportejo, la "Aŭla Magna" ĝenerala Biblioteko. La vico de konstruaĵoj de la malsanulejo apartenas al la Universitato kaj nomiĝas "Calixto Garcia". La kuracosciencaj studentoj praktikas dum la lastaj kursoj kiel flegistoj en la malsanulejo. Estas stratetoj kaj ĝardenoj inter la diversaj konstruaĵoj. En la centro de la ĉefa aro de konstruaĵoj troviĝas la "Placo Rektoro Cadenas".

Ĝi estas ĉirkaŭita de la muzeo, la biblioteko, la fakultato de Leĝoscienco kaj la Rektorejo. Ĝenerale ĉi tie oni efektiviĝas la prezentaĵojn de la Universitato "Teatra Grupo".

: : : :

Nun, karaĵ legantoj, sekvu min al Hispanujo kaj imagu ke estas la 18a de Marto, do la festo de Sankta Jozefo. La festoj okazas la vesperon de la 18a de Marto, do la nokton antaŭ la festo de Sankta Jozefo. Tiu festo estas en "Valencia" la plej bela kaj ĉarma festo de la regiono. Je la 10a vespere ni iras viziti la "Fallas". Ni alvenas al placo kaj meze de ĝi staras granda "Falla". Ĝi prezentas mezopokan kastelon tre bele ornamitan. Ĝi estas tute konstruita el ligno kaj ŝajnas tamen esti vera kastelo el ŝtono. Ĉirkaŭ ĝi estas ĝardeno kun floroj, kaj lageto. Apud la lageto estas benkoj kun paroj de geamantoj kiuj devas reprezenti "Romco kaj Juliette". Ĉirkaŭ la "falla" estas granda lumigado kaj multaj kontemplas ĝin. Post tiu "falla" ni iras al alia placo kie staras alia "falla". Ĝi reprezentas vaporsipon. Ankaŭ ĝi ŝajnas vera ŝipo! Kaj tiel ĉe diversaj stratoj ni vidas alian "Falla'n". Kiam sonas noktmezo oni povas ĝui la belan spektaklon, ĉar ĉiuj "Falla'j" komencas ekbruli. La urbo estas lumigita per multaj grandaj fajroj. Ankaŭ ni vidas teknikaĵojn kiuj kunigas unu "Falla'n" kun la alia: estas mirinda spektaklo. Intertempe oni aŭdas la dolĉan muzikon sed jen troviĝas sinjoroj, kiuj devas juĝi kiu el la "Falla" estis la plej bela; kiu ricevos grandan honorprezon. Kaj la tutan nokton oni promenas tra la stratoj en Hispanujo por admiri ĉion. Tiu festo estas unu el la plej grandaj festoj de Hispanujo.

: : : :

Kaj nun ni iras al la tutnederlanda kongreso de Esperanto kiu okazis la 7a Septembron. Jam de malproksime oni vidis la grandan verdan flagon kaj tre multajn geesperantistojn. La salono mem estis belega, ontute en la spirito de la Internacia lingvo. Sur la scenejo la estraro kaj diversaj spertaj Esperantistoj. Post kiam la Prezidento malfermis la konferencen, pastoro parolis el la nomo de ĉiuj protestantoj ĉi-lande.

.../...

Post tio parolis docento de Universitato kaj estis tre interesa parolado. Li precipe akcentis la grandan valoron de nia komuna kaj internacia lingvo en la diversaj lernejoj kaj la ekzemploj, kiujn li memoris el la praktiko estis finefikaj. La aplaŭdoj preskaŭ estis senfinaj. Laŭvice parolis delegitoj de la neŭtrala movado kaj de la Federacio. Paŭzo. La unua paroladinto post la paŭzo estis rektoro Drost de la katolikoj: la temo de lia parolado estis "la amo de unu al la alia per Esperanto". Tiam parolis la franca profesoro Warringhien, la fama verkisto de "Plena Gramatiko de Esperanto". Entuziasme kaj fervorege li parolis. Partoprenis ankaŭ "S-ro Andreo Eseh, Theo Jung (Heroldo de Esperanto), S-ino v. Weenendaal (Junular Organizo), k.t.p.". Ciuĵ iris hejmen kun nova kuraĝo kaj la forta espero "ni venkos!".

Rosa Jurion.

Preĝejeto kara.

Inter verdaj la montetoj,
valoj ravaj, riveretoj,
trovis mi en bona hor'
ripozejon por la kor'.
Preĝejeto kara,
sonorilo klara
vokas min
al via sin'.

El la bruo de la vivo
fuĝis mi post longa drivo
al ripozo en natur',
for el homa la kultur'.
Preĝejeto kara,
sonorilo klara
vokas min
al via sin'.

Inter ŝirmaj viaj muroj
deŝiriĝis fortaj ŝnuroj,
kiuj ligis min al sort'
kondukanta nur al mort'.
Preĝejeto kara,
sonorilo klara
vokas min
al via sin'.

En preĝejo intermonta
tuŝis min la vivo fonta;
sur genuoj en ador'
petegante por favor'
al la Dio vera,
for el mondo tera,
kroĉis mi
al vi, ho Di'.

Preĝejeto kara,
sonorilo klara
vokas min
al via sin'.
Mi revenos,
kaj min benos
voĉo via,
amo Dia.

John Doorneveldt.

Legant(in)o atentu !

La "Hebrea Esperantista Grupo" de Brussel organizas enketon pri la ĉi-sekventaj temoj:

- 1) Kial Esperanto ne sufiĉe sukcesis ĝis hodiaŭ ?
- 2) Kion ni povas fari por ĝia sukceso kaj disvolvo ?

Interesaj respondoj estos publikigataj en la revuo "La Voĉo de Israëlo".

Estas certe interesaj temoj ! Sendu viajn manuskriptojn al "Nia Esperantista Hejmo" August Gevaertstraat 61 Anderlecht-Brussel.

Ou vi scias ???

-ke la distanco de la suno al la tero estas 150.000.000 Km.? Aviadilo kiu flugas je 600 Km. en unu horo kaj kiam ĝi flugas nokte kaj tage bezonus 10.000 tagojn aŭ 27 jarojn por alveni al la suno.

-ke la pezo de hipopotamo povas atingi 3.000 Kgr ?

-ke oni havas en Afriko pli ol ses cent lingvojn ?

-ke la plej peza sonorilo troviĝas en Moskow. Ĝi pezas 220.800 kgr kaj datumas de 1653. Oni neniam pendigis ĝin.

-ke ekzistas pli ol 1.000.000 specoj da insektoj dividitaj en 600 familioj ?

Daŭrigas paĝo 6.

Daurigo de paĝo 4.

- ke oni jam konas pli ol 200.000 skarabspecoj ?
- ke la sango de normala homo enhavas 4,5 je 5,5 milionoj da ruĝaj sangglobetoj en unu kuba milimetro ?
- ke la nombro de la blankaj sangglobetoj en nemanĝinta homo estas 5.500 je 8.000 kaj post la manĝopreno povas plialtiĝi ĝis 12.000 en unu kuba milimetro ?
- ke la plej malnova orgeno en la mondo troviĝas en vilaĝeto de la insulo Gotland kiu datumas el la 7^a jarcento ?
- ke la negroj dum la longaj vesperinterparoladoj neniam kalumnias prila proksimuloj kaj ke tio ne interesas ilin ?
- ke la rapideco de la lumo estas 300.000 Km kaj ke, laŭ Einstein, tiu rapideco estas la plej granda atingebla en la universo ?
- ke kukulovo estas rimarkinde malgranda rilate al la grandeco de la birdo. Merlovo pezas proksimume 8 gramojn, kukulovo nur 3 gramojn. La pezo de ambaŭ birdoj estas preskaŭ egala (100 gramoj).
- ke ruĝa objekto lumigata per ruĝa lumo ŝajnas esti blanka ?
- ke la Andromedanebula (kiun ni povas vidi per la nura okulo) estas distancata de 1.000.000 lumjaroj ?
- ke unu lumjaro prezentas la distancon de 9 bilionoj Km ĉar unu lumjaro estas 365 X 24 X 60 X 60 X 300.000 Km.
- ke la plej malnova minejo en la mondo estas la kuprominejo de Stora ĉu Svedujo ? La ekspluato komenciĝis en la jaro 1200.
- ke la plej malnova presita ĵurnalo estas la King-Pao, kiun oni fondis en 911 en Peking kaj de post 1351 ĉiam regule aperis ?
- ke la tiel nomata koloradskarabo (ina) post unu jaro havas 52.000.000 posteulojn ?
- ke laŭ la kalkuloj Ruslando en 1970 posedos 250.000.000 enloĝantojn.

Kolektis: Gilbert Bruyneel.

~~~~~

Wij willen weer eens uit "Laborista Esperantisto" 15de Jaargang N° 10 van 1 October 1946, dit zeer degelijk blad, de volgende twee passages overnemen:

ALS EEN WONDER.

En waar je als Esperantist zelfs nog altijd weer bij stil staat, als bij een wonder, bij iets dat toch zo vanzelfsprekend is, nee, zou moeten zijn, dat is het ware internationalisme, dat helaas slechts de Esperantobeweging kenmerkt.

Want is het niet wonderlijk en toch weer zo doodgewoon, een van dankbaarheid getuigende brief te lezen van een Hamburgse moeder, in een Zweeds blad, voor de goede gaven, welke zij dankt aan haar mans Esperanto-vrienden in het vreemde land ? Welk "internationaal" lichaam is in staat te bewerkstelligen, dat de Hongaren gehoor krijgen voor hun desperate toestand van heden, zoals bij ons geschieden kan, waar wij Nederlanders uit een Marrokkans blad -natuurlijk een Esperantoblad-kennis kunnen gemen van een daarin gepubliceerde brief uit Hongarije ? Welke Nederlander die zo goed zijn talen kent, schetste al eens aan de Australiërs onze ellende in de hongerwinter, zoals ons Haagse lid kon doen, in een Australisch orgaan, enkel en alleen, omdat dit blad in Australië in het Esperanto verschijnt !

Zulk nieuws blijft niet tot de Esperantokringen beperkt, dat wordt uitgedragen of in de nationale talen gepubliceerd. En de redactie geeft een wederwoord, dat spreekt tot den Hollander niet alleen, maar tot allen in de wereld die Esperanto kennen. Zijn het geen miljoenen, zij zijn er in alle landen. En dat is meer. Want dat Australische Esperantoblad met het artikel van den Nederlander, en dat Zweedse blad met het stuk van die Duitse vrouw, en dat orgaan uit Marokko met die Hongaarse brief, komen overal in de ganse wereld waar Esperantisten wonen.

Ben zeer fijn artikel is weer "even vastleggen".  
Hier volgt het bijzonderste.

Het is nog altijd de Parijse "Vredesconferentie" welke voldoende stof verschaft, om ons ergernis te geven bij het constateren van zulk een afschuwelijk gestuntel van mensen, die ons vertegenwoordigen moeten en

gerekend moeten worden tot de intelligentia !

Waarom, vraagt men zich af, spreekt de Gasperi in het Italiaans, met zuidelijk vuur nog wel ? Zou hij misschien geen der officieele congres-talen kennen ? Of durft hij zich daarin niet te uiten, omdat hij dan minder welsprekend zou zijn ?

De Nederlandse plaatsvervangende delegatieleider drukt zich in het Engels uit, in tegenstelling met den heer van Boetzelaar, die in het Frans zijn redevoeringen houdt.

Een andermaal lezen wij, dat de Poolse gedelegeerde de debatten opende in een Engels, dat afkomstig moet zijn uit de Pripet-moerassen.

En als Molotof opstond om te spreken, ging ieder die Russisch verstond snel bij hem staan, terwijl de anderen de betekenis van zijn woorden uit zijn gebaren trachtten op te maken !

Als Bidault spreekt ontstaat een incident, want Wisjinsky verklaart diens Frans niet te verstaan en Bidault geen Russisch.

Een andere keer werd het debat geopend met een rede van de Oekraïnen gedelegeerde Mannoelski, die ditmaal niet in het Frans maar in het Russisch sprak. Daarna een korte rede van Byrnes, waarvan de vertaler Molotow de hoofdlijnen in het oor fluisterde.

Wat zegt u, Esperanto ? Zo gaat het immers ook wel !

Van den Hongaarsen minister van Buitenlandse Zaken heet het, dat hij in slecht Frans een lang betoog hield. Wat de waarde van zulk een betoog is, begrijpt ieder die iets van vergaderen weet. Maar in de hoge regionen komt het er blijkbaar niet zo nauw op aan. Men wacht dan maar op de vertaling of leest het wel na in de stukken. Want na de rede van den Zuidslavischen vertegenwoordiger, verklaarde Molotow eerst de vertaling te moeten afwachten, al eer hij aan de debatten wenste deel te nemen. En toen hij optrad, sprak hij in 't Russisch ! Geen wonder, dat men de kleine landen alleen maar hoort, want, zo zegt een overzicht-schrijver: Ieder land in een vredesverdragcommissie, zou de Babylonische sprakverwarring nog veel groter maken.

Als men veronderstelt, dat het kostbare spul van koptelefoons, waarbij iedere afgevaardigde tegelijkertijd dat een speech wordt afgestoken, deze door een tolk vertaald kan opvangen, die waarheid opheft, dan heeft men het mis.

Niet alleen hoort men den spreker niet zelf, maar enkel de stem van den tolk, die zonder mogelijkheid tot overdenken, het door hem gehoorde direct vertaald moet weergeven en dus niet altijd zal slagen in de absoluut juiste bewoordingen, maar veel minder in de bedoeling daarvan. In een beschouwing over de besprekingen in de Veiligheidsraad, merkt een Amerikaans blad terecht op:

Een man als Gromyko, die zo wantrouwend staat tegenover vertalingen, kan niet worden bevredigd door een Engelse vertolking van zijn in 't Russisch uitgesproken redevoeringen. Hij wacht liever op de Engelse (schriftelijke) vertaling om te vallen over een woord, dat hij niet juist acht weergegeven of hem niet bevredigt. Toen een Fransman eens, in de Iraanse kwestie, het woord "accord" gebruikte als vertaling van "soglasie", zeide Gromyko niets omdat hij geen Frans kent. Maar toen na dezen een Engelsman hetzelfde woord opvatte als "agreement" protesteerde hij en hield vol, dat het "understanding" moest zijn. En zo gebeurde het meer. Spreekt Gromyko alleen Russisch ? Neen zijn Engels is goed, beter dan van de meeste anderen in de Veiligheidsraadsraad. Er zijn twee redenen, waarom hij Russisch spreekt. De ene is dat van het prestige; als de vertegenwoordigers van de V.S., Engeland en Frankrijk hun eigen taal spreken, dan willen die van Rusland tonen hetzelfde recht te hebben !

De andere reden is van psychologische aard: de Russische gedelegeerde kan zich n.l. in het Engels niet even precies en niet zo welsprekend uiten als in zijn eigen taal en natuurlijk niet zo vlot als de Amerikanen en Engelsen het kunnen. Als Gromyko Engels spreekt, brengt hem dat in de discussies met dezen in een ongunstige positie.

Velen trachten het werk te bespoedigen door Engels of Frans te spreken. Maar, zegt een der tolken, sommige gedelegeerden zijn zo slecht te verstaan, dat de vertalingen weinig meer dan op de gis gemaakt kunnen worden. De Mexicaanse vertegenwoordiger dr. Francisco Castillo Najera, ongetwijfeld een groot orator in het Spaans, is ternauwernood te volgen als hij Frans spreekt.

Vervolg komt in het November Nr.